

FLANDRA KATOLIKO

MAANDBLAD VAN HET
KATHOLIEK VLAAMSCH
ESPERANTO VERBOND

K. V. E. V.



MONATA REVUO DE LA
FLANDRA UNUIĜO DE
KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

F. U. K. E.

REDAKTIE : TURNHOUTSCHE BAAN, 277, BORGERHOUT (ANT.)
INTERŝANĜ-ADRESO : F. U. K. E., TURNHOUTSCHEBAAN, 277, BORGERHOUT

Sub la verda stelo

MIINHEER, WAT IS ESPERANTO EIGENLIJK ?

Honderde malen werd mij deze vraag met de noodige varianten gesteld, in de laatste tijden, naar aanleiding van de grootrom die wij in vele bladen konden slaan om de aandacht en de belangstelling der sociaalvoelende katholieken te wekken.

Wat is de taal, haar oorsprong, wat zijn haar bestanddeelen, haar voordeelen, haar toekomst, haar wetenschappelijke waarde ?

Wat is de beweging, wat bestaat er in Vlaanderen, elders, op neutraal, anti-godsdiensdig, godsdienstig, politiek, sociaal gebied, enz.

Waar kan ik in Vlaanderen inlichtingen verkrijgen, bestaan er leer- en woordenboeken, aan welken prijs, waar te bekomen ?

Om op al die vragen te antwoorden heeft een onzer flinkste propagandisten het gedacht opgevat een reeks brochuren uit te geven in het bereik van ieders beurs. De eerste is ter pers en draagt als titel " Beknopt Esperanto-leerboekje „ met reeds tal van inlichtingen en een spraakleer met oefeningen voor beginners en belangstellenden. Bij voldoende belangstelling volgt dan kortelings wel een " Geschiedenis der Esperanto-taal en -beweging „.

Als iemand voor 2 frank (15 cent in Nederland) belangstelling voelt voor de Katholieke Esperanto-beweging, die wij als een Apostolaat en Onderafdeeling van de Algemeene Katholieke Actie beschouwen, dan

mag hij dit geringe bedrag storten op postrekening 4123.54 van 't Katholiek Vlaamsch Esperanto-Verbond, Aalst, Erembodegestraat 29, of aan zelfde adres, in postzegels, en dan ontvangt hij vrachtvrij die brochure.

Wie er 10 kan plaatsen bestelle er onmiddellijk 10. En laat ons gedenken de woorden die onlangs door Eerw. Pater J. Salsmans S. J. in " De Standaard „ geschreven werden :
« Wat is het toch jammer, dat heerlijke uit- »
» vindingen dadelijk ten kwade worden mis- »
» bruikt ! Maar dan is het ook plicht der ka- »
» tholieken, die zooveel mogelijk ten goede »
» te benuttigen, en de vereenigeningen daartoe »
» gesticht, krachtig te steunen ».

Lic. L. Calloens, Voorz. KVEV, Aalst.

P. S. Publicatie van bovenstaand bericht in katholieke bladen ten zeerste aanbevolen, mits vermelding der bron en toezenden van een exemplaar aan schrijver dez. L. C.

La katolika esperanta vivo VOOR DE MEIMAAND

Een eenvoudige landman vertelde eens aan een Pater, dat hij in zware bekoringen, altijd zijn toevlucht nam tot O. L. Vr., en dan steeds den moed en de kracht verkreeg om te weerstaan.
— « En wat zegt ge dan tot O. L. Vr. ? vroeg de Pater. — « Och, » was het simpele antwoord, « ik ben niet geleerd ; ik zeg dan maar altijd hetzelfde : *Maria, gij mijn moeder en ik uw kind* ».

O heerlijke eenvoud ! Wat al wijsheid en waarheid, wat al rijkdom schuilt niet achter die woorden. Laten wij ze stil overdenken, de diepte, de levenshoud ervan peilen... Maria, mijne Moeder, en ik haar kind...

Inderdaad, zijn wij niet allen, door goddelijke aanneming, broeders van Christus! • Ipse primogenitus in multis fratribus • : Hij was de oudste van talrijke broeders (Rom. 8, 29). En is dan Christus' Moeder ook niet onze Moeder?

Zijn wij niet allen ledematen van éénzelfde mystiek lichaam, waarvan Jezus het hoofd is? Dan is ook de Moeder van Jezus, Moeder van ons allen.

Kinderen van éénzelfde moeder! Moeten we dan niet, als broeders elkander beminnen; in peis en vrede samenleven; niemand verachten of benijden; niemand benadeelen in woorden noch werken.

Laten we dan, als kinderen van Maria, in de meimaand de Vredeskoningin bijzonder bidden voor wereldvrede, voor betere verstandhouding onder de menschen. Laten we grijpen naar het Vredeswapen, onze Rozenkrans, en zoo als Katholieke Esperantisten, op subliemer wijze verwezenlijken, wat Zamenhof zong in zijn « Preĝo sub la Verda Standardo » :

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
Antaŭen kun pacaj armiloj!

Houden we steeds voor oogen het edel doel van onze « beweging », nl. te verkrijgen dat :
... amo kaj vero
ekregos sur tero.

L. Dumoulin, S. J.

Literaturo-Legaĵo

ROKAJ PREĜEJOJ EN LA KORO DE ABESINIO

Fino

Laŭkutime tiuj ĉi preĝejoj estis atribuitaj al reĝo, nome Lalibala, kiu, laŭ Abesinia dirado, estis la kvina kristana Neguso. Li naskiĝis en Roba, kaj apartenis al la Dinastio de la Usurpatoroj, pri kiuj nur malmulto estas konata. Oni nur scias ke tiu Neguso, dum Pilgrimado al Jeruzalemo, edziĝis kun araba virino. Post lia reveno, li venigis laboristojn el Palestino, al kiuj li konfidis la konstruadon de la preĝejoj. Laŭ aliaj tradicioj tiuj laboristoj estus Egiptoj kaj Araboj. La loko destinota por la preĝejoj montriĝis al Lalibala en vizio. Tamen ekzistas ankoraŭ aliaj manuskriptoj en miksaĵo de Geeza kaj Araba

lingvo, en kiuj estas skribita ke en tiu loko jam en la plej malnovaj tempoj ekzistis kavernoj.

La legendoj same komunikas, ke anĝeloj ordonis al Lalibala, konstruigi dek preĝejoj. La legendo jene klarigas la kialon de la staranta dekunua preĝejo: Koleriĝinte pri sia ekskludo dum la elekto de la Gardpatronoj por la dek preĝejoj, la sankta militisto suprensaltis sian arduhan ĉevalon kaj venis el la ĉielo por sin venĝi. Tamen li estis kontentigita per la promeso, ke li ricevos pli belan preĝejon ol la aliaj.

La grandvalorecon de la ornamoj de tiuj ĉi preĝejoj oni spertas el la araba kroniko el la deksepa jarcento, kiu sciigas la alvenon de la Mahomedanoj en Lalibala. En tiu estas komunikata: « Ahmed preparis sin marŝi al Tigre. Li transiris montojn kaj danĝerigajn vojojn dum senĉesa pluvo. Liaj homoj mortis pro malvarmo. Tie li atingis preĝejon, en kiu la monaĥoj kunvenis por defendi ĝin per sia vivo. La Imano vidis la sanktejon kaj diris, ke antaŭe li ankoraŭ ne vidis tian. Ĝi estis konstruita el ŝtonegoj same kiel la kolonoj, subtenantaj ĝin. Por la tuta konstruaĵo oni uzis nenian pecon da ligno. Nur la skulptaĵoj en la niĉoj estis lignaj. La Imano kunvenigis la monaĥojn kaj ordonis al ili serĉi lignon. Poste oni ekbruligis fajron kaj kiam tio bruliĝis, Ahmed diris: « Nu, unu el vi kaj unu el ni devas trairi la fajron por vidi kia estas la efiko ». La monaĥestro prezentis sin libervole, sed popola virino ekkriis: « Tiu, kiu predikas la Evangelion, ne mortos antaŭ miaj okuloj ». Samtempe ŝi ĵetis sin en la fajron. Kolere la Imano ordonis eltiri ŝin, sed parto de ŝia vizaĝo estis jam forbrulita. Poste li bruligis la altarojn, forkaptis la kolonfigurojn el la niĉoj, rabis ĉiujn orajn kalikojn kaj silkajn ŝtofojn, kiujn li trovis. »

Nuntempe la preĝejoj de Lalibala estas konfidentaj al la Kristana-Kopta ekleziularo.

El de Kath. Wereldpost
Esperantigis
Joz. Cammaert

Libera Anguleto

SINEKURO!

Jes, karaj amikoj, la estrarfunkcio de nia unuigo estas vere sinekuro. Suliĉas ke en nia revuo

aperu deziro aŭ peto, por ke tuj alvenu amaso da leteroj, eĉ tiel multnombraj ke la sekretario ne scias kion li unue akceptos. Sufiĉas ke nur malgranda sciigo pri nova eldonaĵo, havebla ĉe FUKU, eĉ je alta prezo, por ke el ĉiu flanko pluvu mendoj kaj ke tuj novan eldonon la presisto devu prizorgi. Pro manko de loko ni devas rifuzi la anoncojn kaj en la tirkesto de la redakcio kuŝas dekoj da artikoloj, kiujn la presisto resendis pro la sama kialo. Pri kunveno, nur kelkaj linioj en kelkaj lokaj gazetoj kaj jen, je la fiksita horo kaj dato, aro da anoj kun interesuloj alvenas tiel multnombraj ke la estraro estas devigata elekti pli grandan salonon. Tiel multe da proponoj estas farataj ke ne estas eble preparoli ilin, sed estu aŭtomate prokrastitaj ĝis la sekvanta kunsido. La estraro eĉ ne havas la okazon preparoli la tagordon.

Post la ekspedo de la revuo monata ne estas eble al la sekretario plenumi la petojn de tiel multe da anoj, sendi pruvekzempleron al la interesuloj kaj ĉiutage li bezonas almenaŭ duonhoron por enskribi la novajn anojn. Kia agrabla vivo!

La kasisto estas ĉiam bonhumora pro la regula alvenantaj pagoj kaj sen ia maltrankvileco antaŭvidas la estonton. Kaj la Prezidanto ĉie trovas nedemanditan helpon ĉiuspecan, kaj sen ia granda laboro la unuigo senĉese antaŭeniras. Feliĉa homo!

Jes, vere, la estrarfunkcio estas sendube sinekuro!
Dan Juvenos.

Tra la Gazetaro

— En Espero Katolika, aperis interesa artikolo pri Pastro Damiaan De Veuster, la Heroa Apostolo de la Lepruloj en Molokai, verkita de Pastro L. Dumoulin S. J.

— Verda Revuo, el Wien, insertis sciigon pri nia Flandra Katolika (Jam aro da demandoj por pruvekzemplero de nia revuo alvenis sekretariejen). — De Bilzenaar. Ni tie legis: Een nieuwe Lente-leergang I kaj II.

— En « De Morgenpost » aperis Ons XVIII-ste Katholiek Esperanto Kongres te Brno — En voor ons Katholieken! — De Ĉe-methode.

— En Nele Borgerhout artikolo pri Esperanto ĉiun sabaton.

— Gazet van Antwerpen: Esperanto als taal.
— Notu bone: Ni insistas pri la fakto ke estas tre facila enkonduki Esperanto-rubrikon en certaj lokaj ĵurnaloj. Dependas nur de la delegitoj kaj de la anoj. Ni havas je ilia dispono kopion de interesaj artikoloj kaj volonte alsendos ilin je tiu celo. Ne forgesu ke Esperanto-artikoloj en niaj gazetoj estas la plej bona kaj taŭga propagandmaniero kaj ankaŭ ke ĝi estas malmultekosta.

Nia movado

PASTRA JUBILEO. — F. U. K. E. fieras pri sia ano, Lia Moŝto Pastro Bamps el Merksem, kiu paŝtriĝis la 11-an de Junio 1911. Al Lia Moŝto, okaze de Lia arĝenta sacerdota jubileo, F. U. K. E. prezentas siajn korajn gratulojn kaj deziras ke la Bona Dio donu al Li ankoraŭ multajn fruktopleajn jarojn. Lia kara formortinta Patrino en la ĉielo certe ĝoje festas kaj jubileas kun sia filo.

Verda Semajno. — Sekve al la ĉefartikolo, aperinta en nia aprila numero, kelkaj delegitoj demandis klarigojn pri niaj planoj. Ni jam indikis la ĉefajn punktojn sed kompreneble ne estas sole la afero de la estraro; nia tuta unuigo estas devigata kunlabori. Nur tiam ĝi efektiviĝos. Tial ĉiu en sia propra medio serĉu ĉu ne estas eble organizi ion, ĉu paroladon, ĉu starigon de kurso, ĉu inserton de sciigo en la loka gazetaro kaj precipe ensendi sugestojn kaj proponojn. Ĉiu faru almenaŭ ion por la progreso de nia Idealo, nia Katolika Esperanto-movado. Dumkongrese tio estos grava punkto preparolota dum nia kunveno, sed ne necesas ke niaj anoj silentu ĝis tiam. Eĉ de nun ni dankeme kunmetos ĉion por ke ni havu konkretan planon je Pentekosto.

LIBRORONDIRADO. — Ni denove insistas ĉe niaj anoj, tenantoj de libro de la FUKU-biblioteko, resendi ilin tuj kaj plej laste du semajnojn post la ricevo. Jam multaj demandoj alvenis kiujn ni ne povas plenumi.

Ni samtempe sciigas al la interesuloj ke novan libron ni akiris: La lastaj tagoj de Dro Zamenhof.

DEZIRAS KORESPONDI 50 geanoj de la Delfta Esperanta Klubo « Ni ĉiam persistos », kun ĉiuj landoj, pri ĉiu temo, letere aŭ ilustritaj poŝtkartoj. Certe respondos. Adreso: P. Henneveld, Delgawseweg 307, Delft (Nederland).

7a FLANDRA KONGRESO GENTO. — Jen detala programo: **SABATON** la 30-an de Majo — 14a: Malfermo de la akceptejo en restoracio "La Renommée", Sint-Baafsplein 3 — 20a: Malfermo de la kongreso en la "Raadskelder", (la suba salonego de la Haloj, apud la Belfrido). Balo, tombolo, (de nekonataj premioj - kiu volas partopreni kunportu ion) deklamoj, kantoj. Notu bone: je la 19.30a la akceptejo translokiĝos al la apuda Raadskelder. **DIMANĈON** la 31-an de Majo — Je la 9a: Katolika Diservo en la kapelo de la Patroj Dominikanoj, Hoogstraat 39. Kiel antaŭaj jaroj ni aŭdos Esperanto-predikon de Lia Moŝto, Pastro Doktoro Jos. Decoene, Redemptoristo. 10a: Kunveno de ĉiuj kongresanoj sur la Paradoplaço (Kouter) — 10.15a: Sekvanta iro al la urbdomo — 10.45a: Fotografado ĉe la ŝtuparo de la urbdomo — 11a: Of. akcepto de la urbeŝtaro kaj vizito de la urbdomo — 12a: Jar-kunsido de Flandra Ligo Esperantista — 13.30a: Festeno kun Folklorista surprizo en la « Raadskelder » — 16a: Promenadetoj al 1) Malgranda Beginejo, 2) Grafa Kastelo, 3) Sta Bavo Preĝejo, 4) Folkloro Muzeo. (Konigu vian preferon - la kongresanoj estos gvidataj grupe) — **17a: Kunveno de F.U.K.E. en la saloneto de la Patroj Dominikanoj, Hoogstraat, 39** — 20a: Esperanta Festo en la « Raadskelder ». **LONDON** la 1-an de Junio — 9a: akurate, forveturo de la ŝipo ĉe la « Recollettenbrug » (ponto apud la Juĝejo) — 9.15a: Ebleco surŝipiĝi ĉe la « Albertbrug » (apud la Sta Petrostacidomo) por tiuj personoj kiuj volas deponi siajn valizojn en la pakejon de la stacidomo — 11a: Alveno en Deurle, naĝado, promenado, societaj ludoj — 12.30a: Tagmanĝo — 14.30a: Reveturo de la ŝipo — 16.30a: Alveno ĉe la Albertbrug. Adiaŭo de la forvojaĝantoj. La aliaj reveturos ĝis la Recolletten-

brug kaj grupe iros al la « Adiaŭa Vespero » en la akceptejo « La Renommée ».

F.U.K.E.-KUNVENO. — Ni speciale priatentas niajn anojn pri nia kunveno je la 17a. Ni estu multnombraj tie kaj montru ke ni ne nur interesas nin pri amuzado sed ankaŭ pri la bonfarto kaj progreso de nia unuiĝo.

INTERNACIA KATOLIKA KONGRESO EN BRNO. — Interesuloj povas ricevi la unuan kaj la duan kongresan numeron ĉe nia prezidanto kaj ankaŭ la 1-an, 2-an kaj 3-an Informilon de la Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo.

Por tiuj kiuj deziras partopreni al tiu kongreso, jen la adreso kie ĉiuj klarigoj estas haveblaj: Al Sinjoro Aleš Berka
Prezidanto de la L. K. K.
BRNO, V jirchàrich 8 (Ĉeĥoslov.)

Ĉiujn demandojn li respondos se oni almetas respondkuponon.

La eblaj partoprenantoj bonvole sciigu siajn nomojn al la Prezidanto.

Ni firme esperas ke inter niaj anoj estu almenaŭ unu kiu reprezentus F.U.K.E. en Brno.

Nia Unuiĝo ankaŭ partoprenos la tiean ekspozicion internacian, kaj sendos tien ĉiujn niajn eldonaĵojn kaj eltranĉitajn artikolojn aperintajn en la Gazetaro pri nia Unuiĝo.

La partoprenantoj de la katolika kongreso en Brno tiamaniere vidos ke F.U.K.E. kvankam nur juna unuiĝo jam multe efektivigis.

F.U.K.E.-PAKJE. — Mogen wij Uw aandacht trekken op het waarlijk voordeelig koopje hetwelk ga bij ons doen kunt? Wij verzenden U vrachtvrij 25 postkaarten + 20 brieven + 20 omslagen van onze vereeniging voor slechts 5 fr. Gezien de groote bijval hebben wij ervoor gezorgd voldoende voorraad te hebben. Te bestellen in Aalst, postrek. n° 4123.54 van KVEV of op ons sekretariaat, postrek. n° 1374.38 van J. Van Deun, Borgerhout.

NOVAJ MEMBROJ.

Pastro Vergaelen, Dendermonde.
Fino C. Quaghebeur, Ledegem.

DONACON de 1 Guldeno ni dankeme ricevis de simpatia samkredano el Veurs bld Haag, Nederlando.

REVUOJ ensenditaj kaj je la dispono de niaj anoj: Haga Katolika Esperantisto
Verda Revuo
Internacia S. O. S. Bulteno (Radio faka)
Aŭstria Esperantisto
Vojo, Vero, Vivo (eldono de I. K. I.).